# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de Ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Bob Felby**

**PLENUMITA 04/08/2022 Kvincentnaŭdekkvara eldono (unua eldono 20/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;


**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**
Alternativaj Novaĵoj https://www.greenvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/ http://thesaker.is/

***Uzindaj ligoj*** *Google Translate* *Plena Ilustrita Vortaro* *Freelang Vortaro*
*lingvohelpilo* *PMEGramatiko* *esperanta retradio* *Plena Analiza Gramatiko*

*Pasintaj AE eldonoj* *Esperanta himno* *duolingo entute* *openclipart.*

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**
Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo
Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Entute 700,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **298,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas **161,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas **144,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)
Nun studas **97,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )

## Surhavu vizaĝmaskon.

*Roger Springer*



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**
**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.** Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la kronviruso. Vi respondecas pri via sano, do portu maskojn.

Karaj Amikoj NOTU! Numero 600 de AE post kelkaj semajnoj kaj eble 601 precize 11 jarojn post unua de 2011, eble unu semajnon pli poste! Kion povus eksteraŭstraliaj gelegantoj, kiel mi, kontribui? s-ro Ueli HAENNI



# la [esperanta retradio]



Donas bonan ĉirkau-5 minutan aŭskultadon kaj legadon ĉiun tagon.

1a aŭgusto 2022

**KLERAJ GEPATROJ HAVAS PLI GRANDAJN FAMILIOJN**

## Arto kaj Belmetio. (AE593)

Mi legis interese la artikolon de Marcel pri arto kaj [bel]metio. Kvankam iuj metiistoj ne estas artistoj (ĉar ili sekvas la ŝablonojn de iuj aliaj) kaj iuj artistoj ne estas metiistoj (ĉar ili donas instrukciojn al aliaj por konstrui siajn artaĵojn), en la "mezo", ne estas ĉiam facile apartigi la du praktikojn.

Mi havas du korektojn: unu historian kaj unu gramatikan:

Arthur Boyd (1920–1999) ne apartenis al la Skolo Heidelberg, kiu estis art-movado de la malfrua 19a jarcento.



La tria frazo de la artikolo estas: "Eble estas utila aŭ interesa, legi miajn nunajn juĝojn de la arto en Aŭstralio." Ĝi devus komenciĝi kiel "Eble estas utile aŭ interese..."

*Jonathan Cooper*"

Kiam oni informas min pri fuŝaj vortoj, frazoj, ktp. kiun mi ricevas dum la unua semajno post la ĝenerala elsendo, ili estas korektitaj antaŭ ol mi sendas kopion al AEA por la arkivoj

http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo *Roger Springer*

## El "La Konversacio"

Laŭ artikolo lastatempe en "La Konversacio", ŝajnas, ke la sukceso en Majo de nia Ĉefministro, Anthony Albanese, speguligas aron da similaj sukcesoj de centro-maldekstraj partioj en Eŭropo kaj en aliaj kompareblaj landoj.

Pluraj el tiuj partioj sukcesis pro la reiro al siaj radikoj, sin forturnante de la 'tria vojo' de Tony Blair aŭ Bill Clinton en la 90-aj, kaj ĉirkaŭprenante kernajn politikojn kiaj altigo de minimuma salajro, plialtigitaj pensioj, pagebla loĝigo kaj karbono-neŭtrala ekonomio. Kaj, dank' al la kronvirusa pandemio, revigligo de publikaj servoj kia sano-prizorgo.

Bone. Tamen, en Francio kaj Britio (malgraŭ la ĵusa konservativa forĵeto de Boris Johnson) la dekstraj partioj ankoraŭ fortas.

*Vera Payne*










Dum Esperanto-Tago estimata BES Esperantisto, Erhard Claus, ĝuis la belajn "Roma Strato" ĝardenojn

Dum nia Esperanto-Tago pikniko en la Roma Parklando en Brizbano, Phillip Anderson ( *vidu foto kun edzino Claire*) aniĝis al nia Societo.
**Ni tre deziras al ili bonvenon,**
*Petro Danzer*

# Mesaĝo el Goma

Saluton gekaraj ,

Unu grupo **Asocio Nova Familio (ANF)**, esperantista kaj bonfara organizo, kiu funkcias en la




urbo *Goma, Demokratia Respubliko Kongo*. Ĝia celo estas prizorgi infanojn, kiuj perdis siajn gepatrojn pro la intercivitanaj militoj en nia lando. Ĝi estis fondita antaŭ kelkaj jaroj, oficiale registrita en la jaro 2021, fare de lokaj aktivuloj de la Esperanto-movado. Organizinte kursojn de Esperanto por infanoj, ni rimarkis ke multaj el la lernantoj estas georfoj kiuj, fuĝinte el la hejmaj vilaĝoj pro la milito, nun loĝas en familioj de nia urbo, kiuj gastigas ilin. Do tio kaŭzis la strebon krei bonfaran asocion por helpi.

Por ni ĉiam problemas organizi la lernejajn pagojn de la georfoj.
Ĉar ni devas nun ekprepari la aĉetojn de la lernomaterialoj kaj uniformoj por la venonta studojaro 2022-2023. Tiam kun viaj helpemaj koroj ni ĝojus ricevi ĉian helpon vian por tio.
Ĉu vi povus financi kompleton por unu, eble eĉ por du, ... georfoj? Ĉu vi konas aliajn karajn homojn, kiuj povus aldone helpi per mondonacoj?

Notindas ke pro la ne-stabilaj prezoj ĉi-tie kaj en la mondo, ni petegas al ĉiu zorganto kaj helpanto, se eblas financi frue por ke ni disdonu ĉion al la georfoj antaŭ komenco de la studjaro, do fine de aŭgusto aŭ komence de septembro.

Ni antaŭdankas al ĉiuj donacemuloj kaj legantoj de tiu ĉi mesaĝo.

Kontaktebla ĉe orfojkongo@gmail.com.

Nome de la Asocio Nova Familio el Goma urbo. *Augustin KAKOZWA*